En julio, 1934, kiam la Konferenco de la Tut-pacifika Budhana Junularo okazis en Japanio, “*The Teaching of Buddha*”, la angla traduko de la supre menciita “Populara Eldono de Instruoj de Budho” estis publikigita de la Tut-Japana Budhana Junulara Federacio, kun la helpo de s-ro D. Goddard, kiel unu el la memorkontribuoj. En 1962, festante la 70-jaran datrevenon de la enkonduko de Budhismo al Usono, s-ro Ehan Numata, prezidanto de la Mitutoyo Kompanio publikigis alian anglalingvan eldonon “*The Teaching of Buddha*”.

En 1965, kiam s-ro Numata fondis “la Budhismisian Misian Asocion” per sia ofermono, li celis disvastigi tra la mondo tiun ĉi “La Instruoj de Budho” kiel unu el la ĉefaj taskoj de la Asocio.

Por realigi tiun ĉi planon, revizia komitato estis establita en 1966. Ĝi konsistis el profesoroj Kazuyosi Kino, Syûyû Kanaoka, Zennô Isigami, Sinkô Sayeki, Kôdô Matunami, Syôzyun Bando kaj Takase Takemi. prof. Humio Masutani, s-ro N.A. Waddell kaj s-ro Tosisuke Simizu ankaŭ helpis revizian laboron. Tiamaniere la angla-japana eldono de “*The Teaching of Buddha*” estis publikigita en nova stilo.

En 1972, profesoroj Syûyû Kanaoka, Zennô Isigami, Syôyû Hanayama, Kansei Tamura kaj Takemi Takase, antaŭ ĉio korektinte tipografiajn erarojn, rekompilis la angle tradukitan tekston.

Poste, komitato konsistanta el profesoroj Ryôtatu Sioiri, Takemi Takase, Hiroshi Tatikawa, Kansei Tamura, Syôzyun Bando, kaj Syôyû Hanayama (ĉefredaktoro) estis organizita por rekompili la japanan version de “La Instruoj de Budho”, kaj tiu ĉi versio estis eldonita en 1973.

Denove, en 1974, komitato konsistanta el Pprofesoroj Kôdô Matunami, Syôzyun Bando, Sinkô Saeki, Dôyû Tokunaga, Kansei Tamra kaj Syôyû Hanayama (ĉefredaktoro) estis organizita por rekompili la anglan version “*The Teaching of Buddha*”, kiun oni faris kun la kunlaboro de s-ro. Richard R. Steiner. Tiu ĉi estis kunmetita kun la japana versio (eldonita en 1973), kio rezultigis la eldonon de la angla - japana dulingva versio.

En 1978 profesoroj Sigeo Kamata kaj Yasuaki Nara aliĝis al la komitato. En 2001, profesoroj Kenneth Tanaka, Syôgo Watanabe, Yosiyasu Yonezawa, kaj Sengaku Maeda (provizora ĉefredaktoro) aliĝis al la editora komitato.

En 2013, la Societo por Promocio de Budhismo (*the Buddhist Promoting Society*) ŝanĝis sian organizon statutan de “Fondusa Jur-Persono” al “Publik-Interesa Fondusa Jur-Persono.” Okaze de tiu ĉi ŝanĝiĝo, la editora komitato rekonstruis sian membraron kun profesoroj Sengaku Maeda (ĉefredaktoro), Zennô Isigami, Kiyotaka Kimura, Kenneth Tanaka, Makio Takemura, Yasuaki Nara, Tizuko Yosimizu, Yosiyasu Yonezawa, kaj Syôgo Watanabe. De post 2017, kun prof. Makio Takemura servanta kiel la nova ĉefredaktoro, la komitato kunvenis ĉiujare por strebi por fari “La Instroj de Budho” efektive respondanta al la bezonoj de la nuntempa socio.

Majo, 2017

Pri Esperanta Traduko

En aŭgusto 1980, kiam la 67a Japana Esperanto-Kongreso okazis en Yokohama, en la fakkunsido de Japana Budhana Ligo Esperantista (JBLE), ni decidis traduki kaj eldoni “La Instruojn de Budho” en Esperanto. Por tiu ĉi projekto, s-ro Ehan Numata, prezidanto de “Budhisma Misia Asocio” donis plenan subtenon inkluzive la financon helpon, kaj konsentis eldoni kaj disdoni tion.

La komitato konsistas el la jenaj personoj.

prezidanto: Yosiaki Miwa

vicprezidantoj: Santi Asano, Tisyô Wakizaka

komitatanoj por ĝeneralaj aferoj:

Syônosuke Isobe, Kenzen Minami, Ryûei Samra,

Yosiaki Miwa, Tizuko Tadaisi, Tetuo Yamasita,

Tetuo Nose, Tisyô Wakizaka, Yukiko Hayasi

komitatanoj por tradukaj aferoj:

Santi Asano, Yosiaki Miwa, Masaki Imai, Yûiti Yamasaki,

Hiroshi Ikeda, Tadao Yosida, Zirô Kitahara, Sidô Wataru,

Huzimaru Dazai, David MacGill

Ni volas esprimi la plej sincerajn dankonjn al s-ro Masao Kakuo, kiu afable reviziis la tradukaĵon, kaj al s-ino Yukiko Isobe, ĉefdirektorino de Japana Esperanto-Instituto, kiu donis valorajn konsilojn kun entuziasma subteno.

Fine ĉi tiu publikaĵo ne povas esti perfekta por la enhavo, ĉar la vortoj de Budho estas signifoplene profunda kaj Lia Virto estas tiel senlima ke oni ne povas facile kompreni. Sed ĝi povos pliperfektigi per la helpoj de kompetentaj samideanoj kiuj havas intereson pri Budhismo.

Aŭg. 1981.

Pri la Dua Eldono de Esperanta Traduko

Laŭ la peto de Budhisma Misia Asocio, Japana Budhana Ligo Esperantista reviziis kelkajn partojn koresponde al la nova angla versio.

Feb. 2020

INDEKSO DE ĈIUTAGA VIVO

<i>Homa Vivo</i>	<i>Paĝo</i>	
<i>Linio</i>		
Signifo de vivo	4	23
Reala stato de ĉi tiu mondo	88	21
Ideala vivmaniero	203	1
Malbona vidpunkto pri vivo	44	16
Ĝusta ideo pri vivo	41	1
Antaŭjuĝo de vivo	56	1
Al homoj perdiĝintaj (Fablo)	112	27
Vivo de homo (Fablo)	83	13
Se oni sekvas vivon avaran kaj pasian (Fablo)	83	1
Instruo de maljuno, malsano kaj morto (Rakonto)	86	4
Morto neevitebla (Rakonto)	86	24
La kvin aferoj, kiujn neniu povas plenumi		
en ĉi tiu mondo	47	24
La kvar veroj en ĉi tiu mondo	48	9
Iluzio kaj Iluminiĝo ambaŭ devenas de koro	49	1
La dudek aferoj, kiuj estas malfacile		
plenumi, sed valoraj por homoj	117	23
 <i>Kredo</i>		
Kredo estas fajro	157	3
Kredo havas tri signifojn	158	8
Kredo estas revelacio	159	6
Kredo aperas en sincera koro	158	16
Malfacile estas trovi veron, kiel blindulo apenaŭ		

	<i>Paĝo</i>	<i>Linio</i>
priskribi precizan formon de elefanto (Fablo)	69	24
La vera instruo de la Budho montras, kie		
la Budha-naturo ekzistas (Fablo)	72	16
Pasio kaŝas la Budha-naturon (Fablo)	68	21
Dubo baras kredon	159	15
La Budho estas patro, homoj estas Liaj filoj	34	13
Saĝeco de la Budho estas tiel vasta kaj		
profunda kiel granda maro	33	4
Koro de la Budho estas plena de Granda Kompato	13	1
Kompato de la Budho estas eterna	14	1
La Budho ne havas fizikan korpon	11	19
La Budho predikis tra sia tuta vivo	22	4
La Budho uzis la fikcian metodon de		
vivo kaj morto por persvadi homojn	22	4
La Budho savis homojn el ilia sufero per		
la rimedo de fablo	17	6
”	18	3
La mondo de Iluminiĝo	204	10
Rifuĝo al la Budho, la Darmo kaj la Samgo	156	1
Lernado de la vojo teni moralordonon, praktiki		
la koncentriĝon de koro, kaj agadi saĝe	144	1
La Okera Nobla Vojo.....	146	11
Ses vojoj por atingi la alian bordon de Iluminiĝo	148	1
Kvar ĝustaj proceduroj	147	16
Kvar ĝustaj vidpunktoj	147	10
Kvin kapabloj por akiri Iluminiĝon	147	16
Kvar senlimaj statoj de koro	150	1
Homoj kiuj komprenas la Kvaroblan Noblan Veron ..	39	10
Morto de homo kaj efemereco de vivo	10	25
Recitulo de la nomo de la Amida-Budho		
naskiĝas en Lia lando de Purego	101	27

	<i>Paĝo</i>	<i>Linio</i>
Faru lumon el vi mem, konfidu al vi mem	9	3
<i>Ekzercado de Menso</i>		
Distingi tion, kio estas por vi la plej grava (Fablo)	133	9
Gardu vin pri via unua paŝo	117	19
Neniam forgesu tion, kion vi serĉas (Fablo)	134	20
Por atingi sukceson oni devas toleri multe		
da malfacilaĵoj	139	23
Streĉu vin eĉ en ripetitaj malsukcesoj (Rakonto)	151	13
Ne maltrankviliĝu vin eĉ en mizera		
cirkonstanco (Rakonto)	110	9
Komprenanto kaj obeanto de la Nobla Vojo similas		
al homo, kiu eniras en mallumon kun lanterno ...	39	26
Oni trovas instruon ĉie, kie ajn li iras (Rakonto)	142	12
Homo inklinas movi en la direkto, al kiu		
sia koro gvidas	108	14
La plej grava punkto de la instruo estas en		
tio, ke oni regas sian koron	9	18
Regu vian koron antaŭ ĉio	184	1
Se vi regas vian koron	108	19
Diversaj statoj de la koro (Fablo)	105	25
Koro neniam estas la ego-personeco	46	14
Neniam permesu la koron ŝanceligi vin	9	6
Venku vian koron	136	12
Estu la mastro de via koro	10	2
Ĉiuj malbonoj venas de korpo, buŝo kaj koro	79	19
Rilato de koro kun vorto	111	17
Via korpo estas nenio alia ol prunteprenita (Rakonto)		127
.....	10	
Ĉi tiu korpo estas plena de ĉiuspecaj malpuraĵoj	115	27
Ne Nestu avida ie aĵoj	9	6

	<i>Paĝo</i>	<i>Linio</i>
Tenu viajn korpon, buŝon kaj koron puraj	110	1
Neniam deflankiĝu, sed klopodu (Rakonto)	150	23

Homa Sufero

Homaj suferoj devenas de alligiteco de koro	38	1
Kiel defendi sin kontraŭ suferoj	11	9
Iluzio kaj malsaĝeco estas la enirejo e Iluminiĝo	57	26
Kiel liberigi sin el suferoj	104	1
Kiam varma fajro de pasio estas estingita, tiam pura Iluminiĝo estas atingebla	126	6
Amoravido vere estas la fonto de iluzio	78	19
Amoravido estas vipuro kaŝita en floroj	78	21
Neniam havu alligitecon al brulanta domo (Fablo)	17	20
Pasio estas la fonto de eraroj (Fablo)	105	18
Ĉi tiu mondo estas en brulanta fajro	76	11
Avideco je la fameco kaj honoro bruligas homojn	106	22
Avideco je la riĉeco kaj volupto ruinigas homojn	107	1
Diferenco inter saĝulo kaj malsaĝulo	108	20
Malsaĝulo neniam sciiĝas pri sia eraro (Fablo)	125	13
Malsaĝulo envias bonan feliĉon de aliulo nur surbaze de rezulto	125	17
Agmaniero de malsaĝulo (Fablo)	130	14

Ĉiutaga Vivo

Donu oferadon, sed forgesu pri via agado	148	24
La sep specoj de donado	148	28
Metodo akiri riĉecon (Rakonto)	129	9
Metodo akiri feliĉon	117	12
Neniam forgesu afablecon ricevitan (Rakonto)	123	19
Diversaj karakteroj de homoj.....	81	16

Indekso

	<i>Paĝo</i>	<i>Linio</i>
Malfeliĉo ĉiam sekvadas la deziron de venĝo	117	1
Metodo kvietigi la sento de indigno (Rakonto)	199	19
Neniam maltrankviliĝu per riproĉo de aliulo (Rakonto)	109	7
Homo ne vivas por vestaĵo, manĝaĵo aŭ ŝirmilo	178	21
Manĝaĵo kaj vestaĵo ne estas por komforto nek por plezuro	104	16
Kiamaniere vi devas pensi okaze de manĝado	180	26
Kiamaniere vi devas pensi okaze de vestiĝo	180	9
Kiamaniere vi devas pensi okaze de dormado	181	13
Kiamaniere vi devas pensi kiam estas varme aŭ malvarme	181	4
Kiamaniere vi devas pensi pri via ĉiutaga vivo	179	19

Ekonomio

Ĝusta uzado de aĵoj (Rakonto)	191	10
Posedaĵo neniam restas eterne	190	26
Ne amasigu monon sole por vi mem	193	7
Metodo akiri riĉecon (Rakonto)	129	9

Familia Vivo

La familio estas la loko, kie la koroj de ĝiaj membroj venas en kontakto kun unu la alia	189	1
Agoj kiuj difektas familion	185	1
Vojoj per kiuj oni rekompencas grandan ŝuldon al siaj gepatroj	188	23
Ĝusta vojo inter filoj kaj gepatroj	185	15
Ĝusta vojo inter edzo kaj edzino	186	7
Edzo kaj edzino devas havi saman kredon		

	<i>Paĝo</i>	<i>Linio</i>
(Rakonto)	192	8
<i>Vojo por Senhejmaj Gefratoj</i>		
Homo ne estas senhejmaj gefratoj nur pro ke li vestiĝas kiel monaĥo kaj recitas sutron	172	17
Senhejmaj gefratoj ne estas heredantoj de la templo kaj ĝia posedaĵo	171	1
Avareca homo neniam fariĝas vera monaĥo	171	7
La vera vivo, kiun senhejmaj gefratoj devas sekvi	171	18
<i>Socia Vivo</i>		
Signifo de komuna socio	196	3
Efektiva stato de komunumo en ĉi tiu mondo	88	21
Tri specoj de organizaĵoj	196	8
Vera komunuma vivo	196	17
La granda lumo, kiu lumigas la mallumon	195	7
Harmonio en homa rilato	197	3
Rimedo al harmonio en komunumo	198	1
La idealo de la eklezia societo	197	9
La socia idealo de la budhanoj	204	1
Tiu ruiniĝos, kiu malordigas ordon (Fablo)	124	17
Tiu ruiniĝos, kiu estas ĵaluza kaj kverelas kun aliulo (Fablo)	124	17
Respektu maljunulon (Rakonto)	124	17
Agmaniero de studanto al sia instruisto	185	25
La leĝo de amikeco	186	16
Elektado de bonaj amikoj	187	23
Rilato de mastro kaj liaj servistoj	186	26
Konduto al krimulo	193	14
Grava punkto kiu koncernas instruanton de la Darmo	173	23

SANSKRITA GLOSARO
(Je Alfabeto Ordo)

ANĀTMAN (Neegoo)

Tiu ĉi estas unu el la fundamentaj doktrinoj de Budhismo. Tio estas, ĉiuj ekzistoj kaj fenomenoj en la mondo ne havas sian substancon, kiun oni povas kapti. Ĉiuj religioj en Hindio en antikva tempo klarigis egoon kiel substancon de ĉiu ekzistaĵo. Sed Budhismo neis egoon kaj instruis, ke ĉiu estaĵo ne estas konstanta. Ĉar ĉiu estaĵo aŭ fenomeno neniam estas eterna, ili ne havas substancon. Krome tiu ĉi egoo respondas al animo en alia religio.

ANITYA (Nekonstanteco)

Tiu ĉi vorto signifas, ke ĉio aperas kaj malaperas kaj ĉiam ŝanĝiĝas, kaj ke nenio restas en sama stato. Tio estas unu punkto, kiu montras la idean situacion de Budhismo, kiu estas malsama ol alia religio. Estas grave, ke Budhismo instruas kvar etaĝojn — ĉio naskiĝas, daŭras, ŝanĝiĝas kaj poste estingiĝas, tial observante tion ĉi kiel “suferon” ni devas fari la ŝancon de religia introspekto. De situacioj de diversaj branĉoj estis faritaj diversaj metafizikaj analizoj, sed ni neniam devas emfazi nur la flankon de pesimismo kaj nihilismo, ĉar kreiĝo kaj disvolviĝo ankaŭ faras unu flankon de nekonstanteco.

AVIDYĀ (Nescio)

La stato, en kiu oni ne havas pravon saĝon. Tio estas malsaĝo, kiu estas la fundamento de iluzio. En ĉiu skolo analizoj kaj klarigoj estas diverse faritaj, sed ĉiu markas ĉi tion kiel la motivan forton, kiu instigas blindan pasion. Laŭ la leĝo pri la dek du kaŭzo-rilatoj, kiu klarigas kaŭzon-rezulton de ĉiu estaĵo per ŝtupoj, klarigis, en la unua ŝtupo ekzistas nescio. Oni povas diri, ke ĝi estas blinda volo de avido en vivado.

BODHISATTVA (Bodisatvo)

Origine tiu ĉi vorto esprimis Ŝakjamunion, kiu ankoraŭ estis ekzercanta antaŭ sia vervekiĝo. Ĝi estas homo, kiu serĉas Iluminiĝon. Post la leviĝo de Mahajana Budhismo tiu ĉi vorto havis pli grandan signifon kaj montris tuton da Mahajanaj Budhanoj. t.e. tiuj, kiuj praktikadas supre celante Iluminiĝon kaj tiuj, kiuj klopodas dezirante malsupre gvidi aliajn homojn al Iluminiĝo. Ĉiuj ĉi homoj nomiĝas Bodisatvo. Plue sanktuloj kiel Avalokiteŝvaro aŭ Kŝitigarbo, kiuj havas transcendan forton, ankaŭ nomiĝas Bodisatvo. Tiuj ĉi sanktuloj ŝarĝante parton da laboroj de kompato kaj saĝo de Budho kiel vicsavantoj aperis responde al homaj ĉagrenoj.

BUDDHA (Budho)

Tiu ĉi vorto deveninta el la sanskrita signifas “Iluminiĝinto”. Komence ĝi signifis nur Ŝakjamunion, fondinton de Budhismo. Celo de Budhismo estas ke ĉiu atingu tiun ĉi staton de la Budho, sed iom post iom naskiĝis diversaj skoloj kaŭze de diferenco de opinioj pri ekzakta difino de Budho. Mahajana Budhismo diras, ke diversaj eternaj Budhoj estis/-as/-os krom Ŝakjamunio. Ekzemple Tatagato Amitabo, Maha-Vajroĉano, Vajroĉano, kaj aliaj, kiuj aperis antaŭ longlonga tempo. Ili estas skribataj aŭ parolataj kiel objektoj de adoro aŭ ĉefrouloj de instruo. Krome en Japanio oni kutime nomas mortinton “Hotoke” (japana nomo de Budho); tiu ĉi kutimo eble devenis de Purlandismo, unu el kies branĉoj instruas, ke mortinto naskiĝas en Purlando kaj ekzercas sin por fariĝi Budho.

BUDDHATĀ / BUDDHATVA (Budheco)

Semo, per kiu iu ajn ekzistaĵo povas fariĝi Budho. Oni povas nomi ĝin kaŝita forto aŭ kapableco, ke iu ajn homo povas atingi Iluminiĝon. En iu sutro de Budhismo, estas jena frazo: “Ĉiuj estaĵoj havas Budhecon”. La Budhisma starpunkto pri egala tiu kapableco estas vidata en tio, ke ĝi trovas sendistinge en ĉiuj vivaĵoj la eblon fariĝi Budho, ĉu homoj, ĉu animaloj. Tiu, kies Budheco aperis ekstere, estas nomata Budho.

DHARMA (Darmo)

Vera instruo, kiun predikis Budho. La konkreta enhavo estas kolektita en tri sanktaj libroj, nomataj Sutro (kolekto de Budha-instruoj), Vinajo (kolekto de reguloj predikitaj de Budho) kaj Abidarmo (kolekto de komentarioj). Darmo estas unu el la tri trezoroj. La tri trezoroj konsistas el Budho, Darmo kaj Samgo, kaj estas la fundamenta bazo de Budhismo.

HETU-PRATYAYA (Kaŭzo-Kondiĉo)

Kaŭzo kaj kondiĉo. Kaŭzo estas rekta motivo, kiu naskas rezulton. helpate de diversaj eksteraj kondiĉoj. Ĉar ĉio aperas kaj malaperas laŭ kaŭzo kaj kondiĉoj, la rezulto estas nomata “Aĵo naskita de kaŭzo-kondiĉo.” k.t.p. Ke oni akceptas plombe tiun ĉi leĝon, estas bezonata kondiĉo por eniri en Budhismo. En Japanio oni kutime uzas tiun ĉi vorton en malbona signifo. Sed ĉar tiu ĉi kutuma uzo de la vorto estas io transformita kaj foriris de signifo, ni devas esti atentemaj.

KARMAN (Karmo)

Ĝenerala signifo de tiu ĉi vorto estas “agado”. Sed kutime ĝi estas uzata en la senco de “potenciala forto”, kiu estis portata kiel rezulto de antaŭa agado. Ĉar unu ago certe alportas rekompenco, bonan aŭ malbonan kaj feliĉan aŭ malfeliĉan, ĝia influa forto estas rigardata kiel karmo. Tiel karmo estas preskaŭ samsignifa kiel rekompenco de la agado en antaŭa mondo. Plue estas tri kategorioj de karmo: korpa, parola kaj mensa.

KLEŚA (Vulgara Pasio)

Ĉia spirita agado de homo, kiu malhelpas ĉiun efektivigon de Iluminiĝo. Multaj avarecoj, kiuj estas ligitaj kun homa vivo, ĉagrenas, malordigas kaj ĝenas homajn korpon kaj menson. Ilia fonto estas avareco kaj alkroĉiĝo, kaj bazas sin sur iliaj vivoj mem. Avido, kolero kaj malsaĝo estas ĝiaj fundamentoj. Multaj pasioj naskiĝas el tiuj ĉi. Ĉar tiuj ĉi pasioj estas malhelpaĵoj de Iluminiĝo, oni devas estingi ilin en la procezo de praktikado. Sed ankaŭ estas alia pensmaniero, kiu aprobas la pasion kiel saltilon al Iluminiĝo.

MAHĀYĀNA (Mahajano)

En la daŭro de Budhana historio, jen aperis du ĉefaj fluoj de penso, Mahajano kaj Teravado (aŭ Hinajano). Mahajana tipo de Budhismo disvastiĝis en Tibeto, Ĉinio, Koreio, Japanio kaj tiel plu. Dume Teravado disvastiĝis en Birmo, Sri-lankao, Tailando ktp. La vorto signifas “Granda Veturilo,” kiu povas akcepti suferojn de ĉiuj vivaĵoj en ĉi tiu mondo de naskiĝo-morto, sen distingo, kaj veturigas ilin al la stato de liberiĝo.

MADHYAMĀ-PRATIPAD (Meza Vojo)

La vojo senekstrema, kiu forlasis antaŭjugôn. Tio montras la pozicion de Budhismo. Tial en ĉiu skolo de Budhismo la ideo de meza vojo estas estimata kaj alte taksata. Tio signifas ne nur moderan vojon. Ĝi estas la vojo, kiu forigante alteniĝon al io penetras egale en la aktualecon. Ĝia enhavo estas, ke ĝi neas ambaŭ ekstremojn kaj aŭfhebas ilin. Ekzemple ĝi neas ambaŭ ekstremojn de esto, t.e. “io ne ekzistas” kaj “io ekzistas eterne”. Oni povas nomi ĝin unu el la dialektikoj.

MAITRĪ-KARUṆĀ (Kompato kaj Favoro)

Tiu ĉi vorto-kombino estas fundamenta doktrino de Budhismo. Ĝi havas du signifojn: Kompato estas “doni feliĉon al iu” kaj Favoro signifas “forigi suferon el iu.” Tiu, kiu komprenas ĉi tion kaj amas egale ĉiujn homojn, estas vekiĝinto, Budho. Du Bodisatvoj Avalokiteŝvaro kaj Kŝitigarbo estas simbolas tiun ĉi spiriton. Facile dirite tio signifas, ke oni ĝojas kune kun aliuloj kaj malĝojas kune kun aliuloj.

NIRVĀNA (Nirvano)

En sanskrito tiu ĉi vorto signifas “blovestingi”. Ĝi estas la situacio, kiun akiras tiu, kiu blovestingis siajn fajrojn de avareco. Eeniĝo en tiun ĉi situacion estas nomata “plena nirvano”. Kaj tiu, kiu atingis tiun ĉi situacion, estas nomata Budho. Oni uzas tiun ĉi terminon por la momento de la tempo, kiam Ŝakjamunio forpasis. Sed ordinare estas pensata, ke Ŝakjamunio atingis Nirvanon, kiam li fariĝis Budho en 35 aĝoj.

PĀLI (Palio)

Palio aŭ la palia lingvo estas mezhinda lingvo kaj la plej frua sankta lingvo de budhismo. La Budho Gotamo, kiu loĝis en Norda Hindio, parolis almenaŭ unu formon de prakrito, eble plurajn; la budhisma kanono de la teravado estis redaktita en normigita prakrito, kiun oni nomis tutsimple "tekstlingvo" (pāli). Palio estas parenca al Sanskrito, sed ne estas ido de Sanskrito. La buŝa instruado de la Budho en Palio venis al Cejlono en la 4-a jarcento a.K., kaj tie ĝi estas skribe fiksita kelkajn jarcentojn poste (vidu Tripitako). El Hindio kaj Cejlono, la lingvo disvastiĝis en multajn landojn, precipe al la regiono tiam nomata palie Suvanna-bhūmi, sanskrite Suvarna-bhūmi. "Or-lando", kie nun estas Birmo, Tajlando, Laoso kaj Kamboĝo.

PĀRAMITĀ (Paramito)

Tiu ĉi vorto estas sanskrito kaj havas signifon “transiri (al la alia bordo)”. Tio estas, iu transiras de tiu ĉi bordo de iluzia mondo al la alia bordo de Iluminiĝo. Ordinare estas ses specoj de paramito: donaco, observo de preceptoj, pacienco, klopodo, meditado kaj saĝo. En Japanio unusemajna periodo de printempa kaj aŭtuna ekvinosoj estas nomata “Paramito” kaj en tiuj ĉi periodoj entuziasmaj budhanoj praktikas tiujn ĉi ses paramitojn.

PARIṆAMĀ (Parinamo)

Tiu ĉi vorto signifas, ke oni transdonas al aliaj viv-estaĵoj siajn meritojn akumulitajn pere de bonaj agoj, kiujn iam li faris. Estas du okazoj — por sia propra vekigo kaj por aliuloj. Reciti sutron en la okazo de funebra ceremonio estas unu tipo de parinamo, tiel oni kredas, ĉar mortintoj jam ne povas fari bonajn agojn kaj necesas, ke iliaj parencoj aŭ amikoj devas fari bonon anstataŭ mortintoj.

PRAJÑĀ (Saĝeco)

Unu el la ses paramitoj. La mensa funkcio, per kiu oni povas percepti vivon sen eraro kaj distingi, kio estas vera kaj kio estas falsa. Tiu, kiu akiris tiun ĉi saĝecon perfekte, estas nomata Budho. Tial, tiu ĉi estas la plej rafinita kaj luminiĝinta saĝeco, distingenda de ordiara homa inteligeto.

PRATĪYA-SAMUTPĀDA (Dependa Ekesto)

Dependa (aŭ Interdependa) ekesto estas budhisma filozofia teorio, kiu asertas, ke ĉiu darmo (aĵo) ekestas en dependo de aliaj darmoj: Se tio ĉi ekestas, tio ekestas; se tio ĉi ĉesas ekesti, tio ĉesas ekesti. Ĝi estas pragmata instruo, kiu aplikiĝas al sufero (sanskrite “dukkha”) kaj la ĉesigo de sufero.

PRAVRAJANA (Forhejmiĝo)

Forlasi vivadon en hejmo kaj praktikadi disciplinon de Budhismo. En Hindio ĉi tia praktikado sen hejmeco estis rigardata kiel ordinara afero.

SAMGHA (Frataro)

Aro, kiu konsistas el disĉiploj de Budho. En frua tempo, ĝi konsistis el monaĥoj kaj monaĥinoj. Poste, kiam la Mahajama movado ekestis, laikaj kredantoj viraj kaj virinaj, kiuj ekzercas sin cele al luminiĝo, ekhavis sian pozicion en la Frataro. En tiu ĉi kazo la Frataro konsistas el la kvar: monaĥo, monaĥino, upasako (laika kredanto vira), upasakino (laika kredanto virina).

SAMSĀRA (Sansaro, Metempsikozo)

Sansaro estas vorto el Sanskrito, kiu signifas “vagado” aŭ “mondo”, kun kunsenco de cikla, cirkvita ŝanĝo. Ĝi ankaŭ temas pri la teorio de renaskiĝo kaj la ciklo de ĉiuj vivoj, aferoj, ekzisto, fundamenta parto de ĉiu darmo. Oni ofte parolas pri sansaro per vortoj kiel metempsikozo, transmigrado, karma ciklo, reenkarniĝo, ciklo de sencela drivado, vagado kaj banala ekzisto. Ĝi ofte estas bilde prezentata en “rado de vivo”.

SANSKRIT (Sanskrito)

Sanskrito estas eble la plej antikva hindeŭropa lingvo ankoraŭ aktive uzata; ĝi apartenas al la hindarjaj lingvoj en la hindirana lingvogrupo de la hindeŭropa lingvofamilio. Iam oni kredis Sanskriton la plej praa el ĉiuj hindeŭropaj lingvoj, sed poste oni trovis ke la hitita, ankaŭ hindeŭropa, estas eĉ pli aĝa. Sanskrito, kiu signifas “pura” aŭ “gramatike ĝusta” lingvo, estas sankta lingvo de pli ol 1 miliardo da homoj (precipe hinduoj kaj mahajanaj budhistoj; aliflanke la kanonaj tekstoj de la teravada budhismo, de la ĝajnismo kaj de la sikismo estas verkitaj en pli junaj lingvoj). Oni taksis, ke hodiaŭ ĝis du milionoj da homoj ĝin parolas kiel duan lingvon, kaj nuntempe oni skribas novan sanskritan literaturon.

ŚŪNYATĀ (Ŝunjato)

Ideo, ke “ĉio, kio ekzistas en la mondo, neniam havas substancon nek egoon.” Ĉar ĉio en la mondo ekzistas de kaŭzo-rilato, senŝanĝa egoo ne ekzistas en ĝi. Tial ni neniam devas esti alteniĝata al la ideo, ke egoo ekzistas aŭ neekzistas. Ĉar homoj aŭ aĵoj ekzistas relative kaj interdepende, ni ne devas esti alteniĝataj al unu ekzistaĵo nek unu doktrino, nek devas rigardi ion kiel absolutaĵo. Ĉi tio estas la fundamenta ideo de sutroj apartenataj al Praĵna-paramito.

SŪTRA (Sutro)

Sankta teksto, precipe pri prelego de la Budho aŭ de iu el liaj disĉiploj. La vorto signifas origine “fadeno”. Unu el la tri eroj de Tripitako.

THERAVĀDA (Teravado)

La suda tradicio de Budhismo estas prezentata de tiu ĉi nomo. En Palia lingvo “Thera” signifas “pliaĝa” kaj “vāda” signifas “instruo”. Do Teravado estas la skolo de pliaĝuloj, kiu historie estis grupo de konservativemaj monaĥoj, kaj postulis firman tenadon de moralordono kontraŭstarante la alia grupo, kiu emis pli liberan kaj progreseman. Estas dirite, ke kontraŭstaro inter la du skoloj jam komenciĝis en frua periodo kelkcent jarojn post la forpaso de Budho.

TRIPITĀKA (Tripitako)

Tripitako, laŭ la signifo de Palia aŭ Sanskrito “tri korboj”, estas la tradicia termino por la budhisma kanona tekstaro. La kanona versio de Teravado estas ĝenerale nomata Palia Kanono. Ankaŭ en Mahajano oni konsideras la Tripitakon kiel aŭtoritatan tekstaron, sed malsame de Teravadanoj, la Mahajana Tripitako inkluzivas aliajn derivitajn tekstojn kaj komentariojn, kiuj estis verkitaj pli poste.

VIJŅAPTI-MĀTRATĀ (Konsciismo)

Unu el la mahajanaj skoloj, kiu asertas, ke ĉio ekzistas nur en la koscio, kaj ke ĉiu fenomeno estas manifestaĵoj de la ok koscioj.

VIMUKTI / VIMOKṢA (Liberiĝo)

Liberiĝo el la iluzia mondo, nome el la modo de metempsikozo kaj eniro en Iluminiĝon nomatan Nirvanon. Budho estas tiu, kiu liberiĝis el tiu ĉi iluzia mondo kaj restas en Iluminiĝo. Ĉar Li estas for de ĉiuj katenoj, Li estas tiu, kiu akiris tutan liberecon.

PRI “BUDHISMA MISIA ASOCIO”

Antaŭ ol paroli pri “Budhisma Misia Asocio” ni devas mencii pri unu japana industriisto nomata s-ro Yehan Numata, kiu estas la fondinto de “Mitutoyo Akcia Kompanio”, kiu produktas precizan mezurilon.

Post kiam li fondis tiun ĉi kompanion en 1934, li estis firme konvinkita, ke la sukceso de ĉiuj entreprenoj dependas tute de harmonia kuniĝo de ĉielo, tero kaj homo, kaj ke perfektigo de humaneco povas esti atingita nur pere de la bona akordiĝo de saĝeco, kompato kaj kuraĝo. Li faris ĉion, kion li povas, sub tiu ĉi konvinkiĝo, cele al la teknika plibonigo de mezurila produktado kaj al disvolviĝo de homa menso.

Estas lia kredo, ke la realigo de mondpaco estas ebla nur surbaze de perfektigo de humaneco, kaj ke Budhismo estas religio por tiu ĉi celo. Tial, dum li direktadis sian kompanion, li klopodis por disvastigo kaj modernigo de Budhismaj muzikoj, pentraĵoj kaj instruoj.

En decembro de 1965 li fondis fonduson verŝante sian privatan havaĵon por entrepreni propagandon de Budhismo kaj samtempe por kontribui al mondpaco. Tiel estis establita Budhisma Misia Asocio kiel publika organizaĵo.

Kiamaniere ni povas disvastigi la instruon de Budho en ĉiuj landoj, por ke ĉiuj homaj estaĵoj povu profiti de ĝi kaj ĝui Lia grandan saĝon kaj kompaton? Jen, trovi la solvon al tiu ĉi demando estas la tasko de “Budhisma Misia Asocio” laŭ la intenco de la fondinto.

Resume dirite, ĉiaj eblaj klopodoj celantaj la disvastigon de Budha instruo estas ĝuste la koro kaj spirito de tiu ĉi “Budhisma Misia Asocio”.

Kiam ni rigardas retrospekte la longan historion de Japanio, kvankam ni havas la kulturon de Budhismo kiel nian gloron, ĝis nun ni ne havis veran Sanktan Skribon de la japana maniero en la vera senco de la vorto. Tiu ĉi libro “La Instruoj de Budho” estis farita sur tia memkritiko.

Tiu ĉi libro servas kiel spirita “nutraĵo” por ĉiu ajn, kiu legas ĝin. Ĝi estas preparita tiel, ke oni povu meti ĝin sur sia skribtablo aŭ kunporti kun si, kaj ĉiam ajn povu legi ĝin laŭvole sub la Lumo de spirito.

Kvankam ĝi ne estas tiel perfekta, kiel ni esperas, la nuna versio de “La Instruoj de Budho” naskiĝis dank’ al laborado kaj klopodado de multaj volontuloj por renkontigi modernulojn kun adekvata, facile legebla, kaj aŭtetika enkonduko en Budhismon, kaj samtempe kun praktika gvido kaj ĉiutaga fonto de inspiro.

“Budhisma Misia Asocio” deziras, ke tiu ĉi sankta libro eniru en multajn hejmojn, estu tenata de multaj homoj, kaj ili tute banu sin en la lumo de instruo.

Opinioj de legantoj estas bonvenaj. Bonvolu senhezite ĉiam ajn turni vin skribe al la Asocio.